

# Svisa Esperanto-Societo informas

1999 numero 5a: novembro / decembro

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto : <gacond@bluewin.ch>

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude Gacond

## Redaktora mesaĝo

Kun literatremuloj el Belgio, Francio, Germanio, Nederlando kaj Svislando mi havis plian fojon la privilegion partopreni staĝon de Ed BORSBOOM pri **la esperanta beletro**. Ĉijare lia temo estis la **poezio kaj prozo ekde 1952**. Ni ricevis aron da legindaj tekst-specimenoj de AULD, BOULTON, CONTERNO, DIEGO, ELGO, FRANCIS, GOODHEIR, HAUPENTHAL, JERVIS, KAMAĉO, LISTER, NEVES, NERVI, PIĉ, STEELE, STIMEĉ, UNGAR kaj URBANOVA, kaj dum kvin matenoj ni analizis tiun antologieton sub la kompetenta gvido de nia sprita profesoro. Tiu septembra semajno ĉe Kvinpetalo en Bouresse orientis nin al pli preciza aprezo de la stila bunteco de verkistoj reale nuntempaj, kiuj esprimiĝas en riĉa esperanto. Ilia inspiranto estas William AULD per *La Infana Raso*. Vere ekabundas en nia beletro artaĵoj reale maturaj, modernaj teme kaj originalaj lingvouze, kiuj atestas, ke esperanto eniris novan jarcenton fore de la balbutoj de la pionira periodo kaj de la teoriemo de la budapeŝta skolo klasikema. Kiam anonciĝas tiu nova periodo beletra, gravas ke nia publiko konatiĝu kun ĝiaj karakterizoj kaj kapablu aprezi ĝiajn plej signifajn verkojn. Ekster ĉia elitismo, en la jaro 2000, mi provos iniciati leg-sabatojn, dum kiuj ni kune iros al la malkovro de niaj modernaj aŭtoroj. Interesatoj sin anoncu!

Claude GACOND, kun la espero, ke kreskos la nombro de la svisoj aliĝontaj al la venonta staĝo de Ed BORSBOOM en septembro 2000.

# Vivo de SES

## La prezidanto informas

La Universala Kongreso en Berlin estis elstara manifestacio de la esperanto-movado. Ĝi staras en forta kontrasto kun nia modesta enlanda agado. Kap ENDERBY, la prezidanto de UEA, vidalvide de la granda nombro da kongresaj helpantoj sur la scenejo, spontane rimarkis dum la impona fermo: "*Kiu diris, ke esperanto ne vivas?*" 40 svisoj aliĝis al tiu kongreso, dum niaj SES-tagoj nombras ĝenerale nur duonon da ĉeestantoj.

Mireille GROSJEAN reprezentis nin aktive en la komitato kaj prenis diversajn iniciatojn. Inter alie ŝi sendis komunikon al la svisa gazetara agentejo kaj disponigis al mi la kongresan rezolucion kaj la salutmesaĝon de Federico MAYOR, la ĝenerala sekretario de Unesko. Mi tuj sendis ambaŭ dokumentojn kun akompana letero al la oficejo de la Svisa Unesko-komisiono.

Kune kun la Svisa Sekcio de ILEI (ILEI-CH) ni provas influi la instruistaran medion. La redakcioj de la svisaj porinstruistaj gazetoj *Schweizerische Lehrer-Zeitung* kaj *Educateur* akceptis aperigi artikolon pri esperanto, kiun verkis Mireille GROSJEAN. (\*)

Post la publikigo de la koncernaj artikoloj ni aperigos anoncojn en la samaj gazetoj por rememorigi la ekziston de esperanto. Por havi iun efikon ni obeas la principon de ripetado.

La laborgrupo pri varbado okupiĝas pri la teknikoj de informado kaj diskutos la tekstojn de gazet-anoncoj, kiuj ofte restas sen rezulto. Por ke leganto perceptu anoncon, la teksto devas esti iom provoka, sed ne blufa. Ni devas ankaŭ disponi pri dokumentoj, por povi pozitive respondi al inform-petoj. Tial ni kreis kelkajn inform-foliojn, kiel *Basisinformationen über Esperanto, Wo/wie kann man in der Schweiz Esperanto lernen, Esperanto im Internet lernbar, ktp...*

Diversfoje mi ricevis kritikan rimarkon, ke la SES-kotizoj estas tro altaj. Eble jes, se oni konsideras, ke SES-ano ankaŭ ofte kotizas al loka grupo kaj al faka aŭ internacia organizaĵo. Tiu impresado restas, kvankam ni penadas por plibonigi niajn servojn. Pro tiuj altaj kotizoj ankaŭ iom malfacilas gajni novajn membrojn. SES ŝajnas esti eliteca klubo. Fakte la kotizoj estas tro altaj nur por la mezaĝuloj, ĉar la junuloj kaj pensiuloj pagas malpli. La alteco iel rezultas de kolektiva abono al *Literatura Foiro*, kiu kostas CHF 4'800 jare. Laŭ la kontrakto kun LF-Koop la

minimuma abonombro estas 200 je la rabatita prezo de po CHF 24. Sed SES havas nur 160 membrojn. La kolektiva abono fariĝos peza kaj estos endanĝerigita, se la membraro malkreskos. Estu klare: redukti senteble la kotizojn signifus rezigni pri la revuo *Literatura Foiro*. (\*\*)

Ni antaŭanoncas jam nun du datojn ankoraŭ provizorajn, ĉar nia programo ne estas finplanita:

**12an de februaro 2000** en Bern: Prelegoj pri:

- 1) Esperanta Civito, kaj
- 2) Tutmondiĝo kaj kulturo.

**San de aprilo 2000** en Luzern: Ĝenerala Kunveno de SES kun rendezvuo por aktivuloj.

Via prezidanto: Bruno GRAF

Redakciaj notoj:

(\*) La germanlingva tripaĝa artikolo estis publikigita en SLZ 1999-10 kun la titolo *Esperanto: Eine internationale Sprache kann nicht nationale Sprache sein* en la rubriko *Sprachgrenzen*. Samnumere jam aperis unua anonco.

(\*\*) Rezigno pri la revuo *Literatura Foiro* tuj kondukus al mia rezigno redakti nian informilon *SES informas*, ĉar SES retroviĝus antaŭ la nesolvebla tasko redakti propran revuon kun **kultura** kaj **informa** enhavoj, kio montriĝis nerealigebla.

La redaktoro: Claude GACOND

## Sukcesa interregiona kunveno de SES en Genève

Por aŭskulti la prelegaron kvar-taman de Claude PIRON, je la 23a de oktobro alkuris en la hotelon *Le Montbrillant* pli ol 40 esperantistoj ne nur el Svislando, sed ankaŭ el la najbara Francio. Tro pesimisma estis nia prezidanto, kiam li rezervis saloneton por nur dudeko da personoj. Do estas en etoso de plena sukceso, ke ĉiuj preme ariĝis antaŭ la prelegonto.

Unue per la temo etimologio Claude PIRON montris, ke kiam Doktoro ESPERANTO verkis sian projekton de Lingvo Internacia, li ne obeis al nur sciencaj principoj de lingva planado, sed kvazaŭ ĉerpis vortelementojn eĥe al siaj arta sento kaj poliglotismo, en kiu la jida lingvo ludis gravan rolon.

Lia dua prelego *Kiom Esperanto taŭgas por kanto-tradukado* eĥis al lia 7-paĝa artikolo pri la sama temo aperinta en la revuo *Franca Esperantisto* Nro 307. En la Brokanta Servo de CDELI deko da specimenoj de tiu ĉi revuonumero estas akireblaj je la prezo de po CHF 3.- por ekzemplero (inklude sendokoston). Interesatoj sendu sian mendon al CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 5038,

Biblioteko de la Urbo, CP 5038,  
2305 La Chaux-de-Fonds aŭ  
☎(032) 967 68 55.

Dum la posttagmezo ne plu estis la lingvisto, sed la psikologo, kiu prelegis. Liaj temoj *Hipnoto* kaj *Kion fari por pli feliĉi?* pasiigis la publikon, kiu malkovris, ke per intelekta malstreĉiĝo oni povas kvazaŭ mem konvinkigi pri sia valoro kaj ke feliĉo eblas, por tiuj, kiuj rigardas pozitive al la ĉirkaŭaj eventoj. Kiu legas la francan foriris kun la emo aĉeti la novan libron de Claude PIRON: *Le bonheur clés en mains*.

Enketo konkluda al tiu agrabla renkontiĝo montris al Bruno GRAF, ke la ĉeestantaro donas sian preferon al unutaga aranĝo, se la okazaĵo ne tro foras la loĝ-lokon. Tio iel klarigas, kial el alemana Svislando venis nur senkulpiĝaj signoj.

Claude GACOND

## Donacoj

La SES-kasistino Barbara POCHANKE dankas pro la sekvaj donacoj en CHF:

**SES:** Tazio CARLEVARO: 30.

**Agado 2003:** David BÜHLMANN: 30.

## Kial donaci al SES

Kiel ĉiujare la Estraro alvokas donacojn al SES per pagilo fiksita en la novembra-decembra numero de SES informas.

Ĉu tio signifas, ke SES troviĝas en financa krizo? Tute ne, sed ĉe la publiko la konateco de esperanto estas mizera. Ni restas tro en la propra medio kaj ne sufiĉe agas ekstere de la esperanta mondo. Necesas regule informi kaj varbi, se ni ne volas stagni kaj malkreski. Estas la tasko de SES prezenti esperanton sur la nacia tavolo.

La kotizoj sufiĉas por kovri la kostojn por administrado, por la bulteno *SES informas* kaj por la revuo *Literatura Foiro*. Sed la kotizoj ne sufiĉas por regule informi kaj varbi. La donacoj ebligas eldoni kaj aĉeti informilojn, fari gazetanoncojn kaj realigi projektojn. Ne estas saĝe daŭre foruzi la asocian kapitalon por la varbado.

La laborgrupo pri varbado kunsidas dufoje jare por diskuti ideojn kaj prepari projektojn. Ĝi testas teknikojn kaj esploras efikajn metodojn por disvastigi esperanton. Varbado kostas multe da mono. Tial faru donacon al SES! La estraro antaŭdankas al vi pro via malavareco.

Via prezidanto: Bruno GRAF

## Nova SES-kasistino

Sekve al la demisio de la nuna kasistino Barbara POCHANKE kaj al tuja alvoko de nia prezidanto Bruno GRAF en *SES informas*, fraŭlino Elisabeth LAUPER, kiu loĝas en La Chaux-de-Fonds, akceptis transpreni la librotenadon de SES ekde la fino de tiu ĉi jaro 1999. Do nia SES eniros la novan jarmilon kun ĉiuj necesaj librotenadaj garantioj, des pli ke Elisabeth LAUPER estas fakulo pri perkomputila librotenado. Ni antaŭdankas al ŝi pro ŝia helpemo, sen forgesi ankaŭ esprimi dankon al Barbara POCHANKE pro ŝia ĝisnuna helpo.

## Memorigo pri

### *Literatura Foiro kaj Heroldo*

En la jarkotizo estas entenitaj ne nur la bulteno *SES informas*, sed ankaŭ la revuo *Literatura Foiro*.

Depost unu jaro niaj membroj povas ricevi:

- a) la gazeton *Heroldo de Esperanto* anstataŭ la revuon *Literatura Foiro* kontraŭ krompago de CHF 10, aŭ
- b) ambaŭ organojn *Literatura Foiro* plus *Heroldo de Esperanto* kontraŭ krompago de CHF 30.

Novaj interesatoj pri la ofertoj a) aŭ b) sendu sian mendon ĝis meze de novembro al la prezidanto: Bruno GRAF, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen, kaj samtempe ĝiru la krompagon al LF-koop (pĉk 12-11114-5, Sté-coop Literatura Foiro, La Chaux-de-Fonds.

Via prezidanto: Bruno GRAF

## Nova broŝureto aperis

Esperanto-Societo Zürich prezentis esperanton sur la vigla strato de la stacidomo la 4an de septembro. Por tiu laŭdinda evento Dietrich WEIDMANN verkis germanlingvan broŝureton kun la titolo: *Esperanto, Brücke über den Abgrund von Babel*.

Ni citu kelkajn subtitolojn por montri la enhavon de tiu ĉi informilo:

*Die Welt ein globales Dorf.*

*Warum nicht English?*

*Sprachunterricht in der Schule - ein Fiasko.*

*Weltweit Kontakte mit Esperanto.*

*Esperanto in Internet.*

SES aĉetis kvanton da broŝuretoj kaj sendas ekzempleron senkoste al interesatoj. Vi povas peti specimon ĉe via prezidanto: Bruno GRAF, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen. ☎ 031 921 44 59.

Bruno GRAF

# Movada vivo

## CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro  
pri la Lingvo Internacia  
**Biblioteko de la Urbo**  
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds  
☎ 032 967 68 55.  
Fakso 032 967 68 29.

†

### Alphonser MATEJKA

se fait un devoir d'informer ses amis et connaissances qu'il vient de quitter cette terre dans sa 98<sup>e</sup> année.

Son corps a été légué à la science et il n'y aura donc pas d'obsèques.

LA CHAUX-DE-FONDS, le  
27.10.99

Home L'Escale

### Mortis Alphonse MATEJKA kunfondinto de CDELI

Alphonse MATEJKA - unue idisto kaj poste tre agema adepto de la planlingvo *occidental* aŭ *interlingue* de Edgar VON WAHL - vige apogis la kreon de CDELI en 1967. Tiam li estis jam emerita dentprotezisto kaj loĝis en La Chaux-de-Fonds. Li tuj aliĝis al la dejora grupo da bonvoluloj, kies

tasko estas la ordigo kaj katalogado de la abunda materialo kolektita de CDELI. Kaj dum dudeko da jaroj, semajnon post semajno, li alportadis donace proprajn dokumentojn, kiujn li entuziasme listigis en katalogon rubrikon al li rezervitan: *Li-AM*. Tio signifas por la Biblioteko: kolekto *Langue internationale* heredaĵo *Alphonse MATEJKA*.

### Elstara konsilanto

Ĉiuj kunlaborantoj ŝatis lian spritan bonhumoron kaj lia poligloteco estis treege utila dum la katalogado de multlingva dokumentaro. Pro sia ĉeĥa deveno, pro siaj studoj kaj restadoj en Germanio kaj Nederlando, kaj pro sia amego al la latina lingvo, li majstris almenaŭ po du lingvojn slavajn, ĝermanajn kaj latinidajn. Krome lia vasta kulturo pri la planlingva fenomeno, kiun li akiris dum multjara redaktorado de la revuo *Cosmoglotta*, ludigis al li en nia grupo rolon de informanto pri la pasintaĵoj. CDELI troviĝis en privilegia situacio kompare al aliaj dokumentejoj sen kapablaj konsilantoj.

### Eldono de monumenta verko

Dum tiu tempo Alphonse MATEJKA helpadis la svedan matematikiston C. E. SJÖSTEDT cele al la pretigo de sintezo de la lingvoj *interlingue* kaj *interlingua* pere de redaktado de monumenta

verko. Tiu ĉi duvoluma libreco  
luksa pli ol mil-paĝa aperis en la  
jaroj 1968 kaj 1970 sub la titolo  
*Le Axiome de paralleles de  
Euclides a Hilbert & Vocabularie  
mathematic in interlingue con  
traduction in angles, frances e  
german*. Alphonse MATEJKA mal-  
avare financis ĝian eldonon kaj  
diskonigon. Li opiniis, ke tiu plan-  
lingva monumento estos epokfara  
kaj kondukos interlingvistikon en  
novan direkton naturalisman,  
solvante la duecon inter *inter-  
lingue* kaj *interlingua* kaj varbante  
al si la lingvistojn kaj la sciencul-  
aron. Sed la entrepreno de  
SJOESTEDT kaj MATEJKA vekis  
nenian eĥon. El la scienca mondo  
kaj el la adeptaro de *interlingua*  
alvenis nenia signifa recenzo, kaj  
silentegis la esperanta mondo.

### **Al sinteno malpli polemika**

Dum niaj tri kunaj aŭtomobil-  
adoj al Winterthur por savi la libr-  
aron kaj arkivaĵojn de la mortinta  
*Interlingue-Servicie*, per kiu Fritz  
HAAS siatempe diskonigis la  
lingvon *occidental-interlingue* kaj  
polemikis kontraŭ esperanto,  
Alphonse MATEJKA esprimis al  
mi siajn seniluziigon kaj ek-  
konscion pri la verŝajna senestont-  
eco de la naturalisma strebado.  
Kaj ekde tiam lia redaktado de  
*Cosmoglotta* iĝis videble malpli  
polemika kontraŭ la aliaj plan-  
lingvaj solvoj. Kiam adeptoj de  
*interlingue* vizitis CDELI-n kaj

komencis ripeti sloganojn kontraŭ  
esperanto, kiel la aserton, ke "*ĝi  
estas lingvo kakofonia kaj kultur-  
regresiga*", je ilia miro Alphonse  
MATEJKA interrompis tiujn dirojn,  
rebatante, ke la zamenhofa lingvo  
estas fakte belsona kaj pli esper-  
porta, ol imagis ĝiaj kontraŭuloj,  
inter kiuj li troviĝis. Kaj li laŭdis  
la pozitivajn kontakteblojn, kiujn  
CDELI alportas al la adeptoj de  
malsamaj planlingvaj tendencoj.  
Li alvokis ne nur al reciproka  
toleremo, sed ankaŭ al super-  
tendencaj interlingvistikaj  
diskutoj. La lastaj numeroj de  
*Cosmoglotta* tial verŝajne perdis  
sian polemikan tonon. Sed tiu  
pacema sereniĝo interlingvistika  
ankaŭ perdigis ĉian pluan labor-  
emon al Alphonse MATEJKA mem  
kaj al lia kunlaboranto Fred  
LAGNEL, tiel ke baldaŭ ĉesis aperi  
ilia famiĝinta revuo *Cosmoglotta*.

### **Planado de la propra morto**

Kiam fine alvenis por Alphonse  
MATEJKA la epoko de lia retiriĝo  
en oldulejon, ĉiuj admiris liajn  
trankvilan saĝon kaj spiritan  
kvieton. Kaj en la maljunula  
hejmo, kie li okupis subtegmentan  
ĉambreton, malgraŭ malfortiĝinta  
vidkapablo, unu el liaj okupoj  
restis perlupea konsultado de am-  
ataj vortaroj de la diversaj lingvoj,  
kiujn li kultivadis. Okaze de niaj  
vizitoj li informiĝis ne nur pri la  
progresoj de CDELI, sed ankaŭ  
pri tiuj de esperanto. Kiel li

harmonie organizis sian vivon, ankaŭ memstare li planadis sian elteriĝon. Tion atestas la mort-anonco, kiun li mem aperigis en la taggazeto *L'Impartial* kaj kiun ni reaperigis enkonduke al nia nekrologo.

### Novaj signifaj donacoj

Kiel ni jam menciis, la dokumentaro de CDELI rezultas plejparte el donacoj. Tiurilate ni menciui, ke la 1-an de septembro Tazio CARLEVARO alportis riĉan kolekton da libroj, revuoj kaj arkivaĵoj: a) parton de sia biblioteko, b) libron kaj dokumentojn de Dante BERTOLINI kaj c) materialon de la itala okcidentalisto TACCONI, kiun transdonis al li esperantisto en la urbo Modena. Tuj la kunlaborantaro de CDELI ekokupiĝis pri la katalogado de tiu grava dokumentaro, kiu plenigas dekon da kestoj.

La 28an de oktobro mi veturis kun mia edzino al Luzern por renkontiĝi kun Paul SCHERER ĉe Franz BRÜGGER en Emmenbrücke cele al la transpreno de la libroro de Lucerna Esperanto-Societo, kiu decidis kuraĝigi sian membraron elprunti esperanto-librojn per petoj rekte sendataj al CDELI, Biblioteko de la Urbo, 2305 La Chaux-de-Fonds.

Claude GACOND

## Universala Esperanto-Asocio

Certe vi ŝatus ankaŭ dum la proksima jaro resti en kontakto kun UEA kaj tiel regule ricevi informojn per ĝiaj diversaj eldonaĵoj. Por certigi tion bedaŭrinde necesas denove pagi la jaran membrokotizon. Tial vi baldaŭ trovos ĉi-koncernan leteron en via leterkesto. Pro via bonvola atento kaj akurata pago la ĉefdelegito antaŭdankas.

La Universala Kongreso 2000 en Tel-Aviv promesas esti aparte alloga travivaĵo. Prospektoj, aliĝiloj kaj ĉiuj informoj haveblas ĉe la peranto. (Detaloj ankaŭ estos donitaj en la letero por la renovigo de la membreco).

La ĉefdelegito: Sonja BRUN  
Waldeggstr. 28, 6343 Rotkreuz  
☎ 041 790 46 40  
Retpoŝto: [smbrun@freesurf.ch](mailto:smbrun@freesurf.ch)

### Redaktaj limdatoj

Por *SES informas 2000 numero 1* (januaro + februaro): 20an de decembro 1999.

Por *SES informas 2000 numero 2* (marto + aprilo): 20an de februaro 2000.

**3** (majo - aŭgusto): 20an de aprilo 2000.



# Grupa vivo

## Basel

### Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

☎ 0049 76 214 57 12

Kunvenoj: 20h00 en Restoracio  
Weiherhof, Neuweilerstr. 107

### Monataj kunvenoj

**Novembre la 25an:** kompilado de  
la programo por la jaro 2000.

**Decembre la 11an:** Zamenhofa  
festo.

## La Chaux-de-Fonds

### Studa rondo ĉe CDELI

ĝenerale je la 2a kaj 4a merkredo de la  
monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude  
GACOND kaj aliaj instruantoj

**Notu en via agendo, ke la ven-  
ontaj kunvenoj okazos novembre**  
la 24an, decembre la 8an, januare  
2000 la 12an kaj 26an. Pli kaj pli  
kreskas la grupo kaj ĉiuj fariĝas  
vigle aktivaj.

De **Kultura Centro Esperantista**  
ni bedaŭrinde ricevis nek  
raporton, nek anoncon de la ven-  
ontaj aranĝoj. Tial nia silento!

## Genève

### Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

☎ 022 740 04 45

Monatkunveno ĝenerale ĉiun unuan  
mardon en la restoracio « *Les*

*Cheminots* », 7, rue des gares, Genève

### Raporto

Pri la monata kunveno de la 5a  
de oktobro, kiun frekventis 15  
personoj, la *Brasikfolio* tiel  
dankas al la preleginto Ernst  
GLÄTTLI:

**E**ntuziasme ni estis

**R**enkonti kaj gastigi

**N**ian samideanon el germana

**S**vislando kiu prelegis

**T**ute agrable por ni.

**G**randa estis nia plezuro

**L**iajn bildojn vidi kaj

**A**ŭskulti liajn travivaĵojn

**T**ra balkanaj landoj.

**T**utkore la ĉeestantoj

**L**in dankas havigi

**I**nteresan vesperon.

### Monataj kunvenoj

**Decembre la 7an:** *Esperanto kaj*  
*kongresoj: riĉigaj renkontiĝoj:*  
kun Yvonne kaj Armand COTTON.

**2000 Januare la 4an:** *Vojoj al*  
*bona interkompreniĝo:* kun  
Mireille GROSJEAN.

**Februare la 4an:** Temo surpriza.

**Marte la 7an:** Ĝenerala Asem-  
bleo.

## Lausanne

### Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale : 389, 1009 PULLY

☎: (021) 729 58 02

E-mail: lausanne.ch @ esperanto.nu

Homepage: <http://www.esperanto.ch>

**Kunvenoj:** Stacidomo, 1-a etaĝo, 20h30  
**Diskuta rondo:** ĉiumonate je la tria lundo  
en hotelo Continental : 18h00-20h00.

## Monataj kunvenoj

**Decembre dimanĉon 12an** post-  
tagmeze ekde la 14h00:  
**Zamenhofa festo** en la restoracio  
*Le Milan* sub la kinejo *Moderne*  
okcidente de la stacidomo kun  
speciala programo **por festi la 80-**  
**jariĝon de Laŭzana Esperanto-**  
**Societo.** Partoprenontoj sin  
anoncu skribe aŭ telefone al la  
societa adreso.

**2000 januare 10an:** temo decid-  
ota.

## Luzern

### Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

☎ 041 280 46 12.

**Kunvenoj:** ĉiun duan jaŭdon de la  
monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00:  
babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj;  
ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita  
parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio  
Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020  
Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2  
de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis  
haltejo-stacidomo Emmenbrücke (ĉ. 100  
m).

## Monataj kunvenoj

**Novembre la 18an:** Festeto kaj  
kompilado de la programo por la  
jaro 2000 kun Paul kaj Margrit  
SCHERER.

**Decembre la 1an kaj 5an** en  
Big Ben.

## Wil

### Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil

☎ 071 911 68 30

**Kunvenoj:** 19.00 en la Restoracio  
Blumeneck, Säntisstr. 1

## Monataj kunvenoj

**Decembre la 1-an:** Zamenhofa  
vespero: kun ĉiuj klubanoj.

**2000 Januare la 5an:** Impresoj  
el Usono (daŭrigo de la septembra  
rakonto per lumbildoj: kun  
Barbara kaj Stanislaw POCHANKE.

## Zürich

### Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH ☎ 01 251 50 25

**Kunvenoj:** 19h15, Akazienstrasse 6,  
8008 Zürich

## Raporto

### Sukcesa varbado surtrata

Sabaton la 4an de septembro nia  
societo muntis standon sur la  
Bahnhofstrato en Zürich. Ni havis  
bonan draton al la veterdioj, ĉar ili  
donis al ni belan tagon sen pluvo.  
Por ni la surprizo estis granda, ĉar  
ĉefe la juna publiko, kiu dum

antaŭaj standoj absolute nenion sciis pri esperanto, ĉifoje praktike ŝiris la informilojn el niaj manoj: "Esperanto! Tio ja estas la lingvo en kiu kantas *Freundeskreis!* Ĉu vi havas ankoraŭ biletojn por la koncerto de hodiaŭ en Winterthur?" (La hazardo volis, ke la grupo *Freundeskreis* efektive la saman vesperon estis koncertanta en Winterthur en plena koncertejo.)

Ni povis vespere, lace sed kontente, forigi nian standon. Pli ol mil informilojn ni disdonis. Pluraj pasantoj petis aldonajn informojn, du personoj (kiuj mem eklernis la lingvon aŭtodikate) aliĝis al nia klubo je la stando kaj nia kurso povis komenci kun kontentiga sukceso je la 4a de oktobro.

Tre grandan pozitivan rezulton ni ankaŭ havas kun niaj danc-kursoj.

## Monataj kunvenoj

Ni renkontiĝas ĉiam la duan lundon monate je la 20h00 en la Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich.

**Decembre sabaton la 4an de la 14h00 ĝis la 17h00:** Zamenhofa festo kun riĉa programo kultura kaj distra. La lernantoj de niaj danc-kursoj prezentos artan spektaklon, sed ankaŭ literaturo kaj aliaj eroj estos ofertitaj kaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj ne mankos.

Gastoj el aliaj urboj estas tre bonvenaj.

## Skribis leganto

Walter KOBELT en Arbon sendis al ni afablan vivsignon, en kiu li interesiĝigas pri la skribreformoj:

*Kiam mi ricevis de la junularo JES la organon Informilo por cxiuj patronoj de JES (decembre 1997) mi multe ĝojis pro la kuraĝo anstataŭigi la supersignojn per x. Tio estas paŝo en la ĝustan direkton. Jam pli frue en la Eŭropa Kalendaro 1984-1985 mi vidis bonan fonetikan reformproponon. Bedaŭrinde la Eŭropa Klubo ne realigis sian proponon.*

Kaj Walter Kobelt informiĝis pri mia opinio koncerne al la nunaj provoj aliel transskribi esperanton.

Ĉar li ne estas la sola, kiu tuŝas tiun ĉi temon, en venonta numero de *SES* informas mi alportos kelkajn vidpunktojn. Estas fakto, ke la utiligantoj de la retroŝto nepre devas elturniĝi por skribi esperanton sen supersignoj. Kelkaj tion faras per la x-sistemo, aliaj per la pli fundamenta h-sistemo kaj aliaj ankoraŭ aliel. Ni registros la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de tiuj diversaj transskribaj rimedoj. Sed eble aliaj legantoj havas vidpunkton. Ilin mi volonte legos kaj citos.

Claude GACOND

**P.P.**

CH-2305

La Chaux-de-Fonds 5

Dieter ROOKE, Äussere Klus,  
4702 Oensingen, proponas inter-  
ŝanĝon de son- kaj vid-bendoj kaj  
volonte akceptas polvkovritajn  
librojn kiel edukan materialon por  
10-jara knabo.

## **KVINPETALO**

### **Esperanto-Centro**

Rue du Lavoir, FR-86410 BOURESSE  
Tel. Kaj faksilo : 0033 549 42 80 74

## **Kurs-programo**

**Decembro 10-15**

**Zamenhofa semajno:** gazetoj  
kaj revuoj en la tempo de  
Zamenhof kun Georges  
LAGRANGE kaj Thérèse PINET.

### **Programo 2000**

**Febuaro 15-19**

**Initiation à l'espéranto** et  
pratique de la langue pour  
débutants kun Josée LAFOSSE.

**Febuaro 22-26**

### **Preparado al Kapableco:**

Traduko kaj disertacio kun  
Georges LAGRANGE.

**Aprilo 11-15**

### **Lingvostudo kaj pedagogio:**

Por lertiĝi lingve: strukturŝanĝaj  
ekzercoj; por kleriĝi literature:  
antologiaj laŭtlejoj; por riĉiĝi  
metodologie: didaktikaj konsiloj,  
kun Claude GACOND.

**Junio 1-4**

**Botaniko** studata tra la regiona  
flaŭro kun Ru BOSSONG kaj José  
VINCK.

**Julio 7-11**

**Pri teatro** kun Paul GUBBINS.

**Inicado kaj praktiko de joko**  
kun Arlette PLUTNIAK.

**Julio 15-21**

**Internacia Konferenco de ILEI**

**Septembro 1-5**

**Astronomio:** inicado kaj  
praktiko kun Patrick LAGRANGE.

**Septembro 8-13**

**Moderna beletra literaturo**  
**esperanta** kun Ed BORSBOOM.